

IX

Idioma Internacional e Religião Universal

Atendamos, desse modo, nós outros, espiritualistas e espíritas, encarnados e desencarnados, ao incremento do Esperanto, em simultaneidade com o esforço de restaurar as colunas do Cristianismo, por santuário vivo da Religião Universal, em bases de amor e sabedoria, no terreno da Bondade Imensurável de Deus e Sua Justiça Indefectível.

Não importa estejamos, na condição de coidealistas do Esperanto, em sintonia com os nossos irmãos católicos, reformistas, ortodoxos, bramanistas, budistas, israelitas, sintoístas, maometanos, zoroastristas, ateus e de quaisquer outras confissões e convicções, porquanto, as correntes de idéias, como as fontes de níveis diversos que deságuam invariavelmente no mar, alcançam sempre o oceano da realidade imutável, em cujas águas as advertências da evolução nos impõem o reconhecimento da própria humildade ante a grandeza da vida, com a impersonalização de nossa fé.

Desfraldemos, assim, o estandarte verde por símbolo de união!

Em qualquer idade, aprendamos!

Incompreendidos, prossigamos!

Alegres, perseveremos!

Esperanto quer dizer "o que espera".

Marchando e servindo, crendo e amando, imperturbáveis, esperaremos.

IX

Internacia Idiomo kaj Universala Religio

Tiamaniere, ni, spiritualistoj kaj spiritistoj, enkarniĝintoj kaj elkarniĝintoj, atentu la pligrandiĝon de Esperanto, samtempe klopodante por la restarigo de la kolumnoj de Kristanismo kiel vivanta sanktejo de la Universala Religio, sur bazo de amo kaj saĝo, sur la tereno de la Nemezurebla Boneco de Dio kaj ties ĉiama Justeco.

Ne gravas, ke, en la kondiĉo de esperantistoj, ni sintonizu kun niaj katolikaj, reformaciistaj, ortodoksaj, bramanaj, budhistaj, izraelistaj, sintoistaj, islamaj, zoroastristaj, ateistaj fratoj aŭ tiuj el ĉiaj ajn konfesioj kaj kredoj, ĉar la fluoj da ideoj, same kiel la malsamnivelaj fontoj elfluantaj en la maron, ĉiam atingas la oceanon de la neŝanĝema realeco, en kies akvoj la avertoj de la evoluado devigas nin rekoni nian propran malgravecon antaŭ la grandeco de la vivo, per la senpersonigo de nia fido.

Nu, ni portu la verdan standardon kiel simbolon de la unuiĝo!

Kiu ajn estu nia aĝo, ni lernu!

Kvankam nekomprenataj, ni iru antaŭen!

Ni persistu ĝojaj!

Esperanto signifas "tiu, kiu esperas".

Marŝante kaj servante, kredante kaj amante, ni trankvile esperos.